

# Eŭropa Bulteno

MAJO 2011, N° 5 (105)

## NIAJ LANDAJ MOVADOJ BRITA ESPERANTO-MOVADO



**Esperanto-Asocio de Britio** (EAB) estas la plej granda [Esperanto-asocio](#) en tiu ĉi lando. Ĝi fondiĝis en [1976](#) kiel registrita bonfara asocio surbaze de [Brita Esperanto-Asocio](#). EAB tiel estas la heredanto de la iama BEA, kiu fondiĝis en 1904, kaj rigardis la jaron 2004 kiel ĝia propra centjariĝo.

Ekde 2001 la sidejo de EAB troviĝas en la vilaĝo de [Barlastono](#) (angle: Barlaston), kelkaj kilometroj sude de la urbo de [Stoke-on-Trent](#), en [Okcidentmezlanda Anglio](#). Ĝi havas rilaton kun la apuda [Wedgwood Memorial College](#), kiun ĝi uzas por kursoj kaj kunvenoj. La Biblioteko Butler (kiu enhavas la kolekton de Montague Butler) ankaŭ troviĝas en la samaj konstruaĵoj.

EAB eldonas du revuojn:

- **EAB Ĝisdate** - (pli ofte konata kiel ĝia angla nomo "Update") kiu enhavas novaĵojn kaj diversajn artikolojn kaj en Esperanto kaj la angla;
- [La Brita Esperantisto](#) - literatura kaj kultura revuo, tute en Esperanto.

EAB ankaŭ eldonas la **Manlibron** (angle: Handbook) kiu enhavas informojn pri diversaj esperantistoj kaj grupoj.

EAB organizas ĉiujarajn britajn E-kongresojn.

Junularo estas organizita en Junularo Esperanta en Britio (JEB).

Ekzistas ankaŭ sekcio de SAT en Britio (SATEB).

Aparta agado okazas ankaŭ en regionaj E-organizo:

Orienta Esperanta Federacio, Okcident-mezlanda Esperanta Federacio, Sud-orienta Esperanta Federacio, Kimra Federacio kaj Esperanta Asocio de Skotlando.

Dum la lastaj kelkaj jaroj famas la laboro de grupo de instruistoj sub la gvido de Angela Tellier kiuj startigis eksperimentan instruadon de Esperanto en kelkaj britaj elementaj lernejoj kun la celo montri ke tio helpas al pli rapida lernado de aliaj fremdlingvoj sub la nomo Saltbreto al Lingvoj (Springboard to Languages). <http://www.springboard2languages.org/home.htm>

Ekzistas ankaŭ speciala grupo por informado pri Esperanto al politikistoj Esperanto-Lobby. <http://esperantolobby.wordpress.com/>

La nuna prezidanto de EAB estas fama lingvisto (fonetikisto) profesoro John Wells.

Se oni volas prognozi la estontecon de Esperanto en Britio (la lando de la angla lingvo) - laŭ progreso lastatempa - la futuro bonaŭguras en Britio. Esperanto ja ne mortis en nia lando !

Lastatempe en la Universitato de Newcastle fondiĝis nova studenta Esperanto klubo. Aliaj tiaspecaj universitataj kluboj ekzistas jam en Surrey, Durham, Bristol kaj Sheffield. La plej lasta nomita en Sheffield rezultis pro iniciato de Max Marzec, studento de Dennis Keefe, Profesoro pri Komerco en Nankina Universitato, Ĉinio

Max organizis la plej grandan [internacian lingvo festivalon](#) iam-ajn okazintan en nia lando. Esperanto estis unu el la ĉefaj lingvoj kaj EAB- prezidanto John Wells estis kaj ĝia honora patrono kaj [gastparolanto](#). Kelkaj parlamentanoj ĉeestis la inaŭguron. BBC raportis kaj televide kaj radie, spite al la samtempa tertremo en Japanio.

Alia pozitiva fenomeno pri la rezultoj de nia informado estas ke ĝi kreskis kaj kvante kaj kvalite. (Ne forgesu ke historie Lord Reith, la fondinto de BBC malpermesis eĉ mencion de la vorto "Esperanto" en ĝiaj programoj.) Unu ekzemplo de multaj BBC televidaj programoj estas la multvidata programo ["The One Show"](#). Lokaj radio-dissendoj ankaŭ abundas.

Aliaj rezultoj vidiĝas per unu paĝo, entute pri Esperanto en "The Times" kaj duon-paĝo en "The Sun". "The Sun" estas la plej legata nacia ĵurnalo en Britio.

Okaze de la "Eŭropa Tago de Lingvoj" ni sendis al Britaj Membroj de la Eŭropa Parlamento, presitan kopion de

["Malkovru Esperanton"](#). Ni retumis samtage al ĉiuj britaj parlamentanoj kaj informis pri agado de ["Esperanto Lobby"](#). Je la ["Internacia Tago de la gepatra lingvo"](#) ni simile agis kaj informis al britaj parlamentanoj pri neceso defendi la rajtojn de

minoritataj [lingvoj](#). Ni rete sendis al ili la jutuban videon por informi ke Esperanto [jam havas](#) reprezentigon en la Unuiĝintaj Nacioj.

Britio estis pioniro - kune kun Italio - de la parlamenta agado kaj nacie kaj eŭrope. Tiu tradicio daŭras.

**Brian Barker**

## POLA ESPERANTO-KONGRESO KAJ EŬROPA HIMNO



De la 31-a de aprilo ĝis la 7-a de majo 2011 okazis en Nowy Sacz en suda Pollando memorinda 32-a Pola Esperanto-Kongreso kiun partoprenis ducent partoprenantoj kun gastoj el deko da landoj. La prezidantino de PEA kaj de la LKK estis Halina Komar, kiu sukcesis organizi ege buntan kaj multflankan aranĝon en kiu ĉiuj povis trovi ion por si. Prelegoj tre variaj plenumataj de kompetentaj prelegantoj, kulturaj programoj altkvalitaj preskaŭ plene profesiaj, interesaj ekskursoj, riĉa libroservo...

Sed la plej valora en tiu ĉi kongreso, maloftaĵo en E-aranĝoj, estis ege altkvalita kunlaboro kun la diversaj lokaj instancoj kaj el tio rezultantaj programeroj.

Kunlabore kun la Urba Kulturdomo la organizantoj ricevis kvalitajn ejojn por la kongreso kaj muzikprogramojn altprofesiajn. La kunlaboro kun la starosto (regionestro) rezultis regalon por ĉiuj partoprenantoj kaj kunlaboro kun la urbestro rezultis per ege interesa programo dediĉita al prifesto de la Eŭropa Tago (la 9-a de majo) kiu

okazis jaŭdon, la 5-an de majo. Tiu programo okazis publike por la urbanaro de Nowy Sacz je la 12-a horo sur la centra urba placo antaŭ la urbodomo. La programo daŭris preskaŭ unu horon. Unue la vicurbestro alparolis la ĉeestantojn kaj sekvis mia parolado nome de EEU per kio estis inaŭgurita la unuan fojon publike kantata eŭropa himno skribita originale en Esperanto. Gejunuloj el meza lernejo tiam defileis kun 27 flagoj de 27 EU-ŝtatoj, sekvis kantado de la eŭropa himno de Umberto Broccatelli en la pola traduko kaj tiam en originala Esperanto. Kantis urba koruso. Sekvis ankaŭ kantado de la pola himno. Poste infanoj de elementa lernejo prezentis spektaklon dediĉe al EU kun flavaj steloj. Fine granda muzika soldata grupo prezentis solenan muzikan marŝprogramon. Ĉeestis ĉiuj partoprenantoj de la Pola E-kongreso kaj beligis la bildon per multaj E-flagoj kaj EU-flagoj.

Filmis ĉion la pola televido, ĉeestis pluraj radio- kaj gazetjurnalistoj.



La tuta manifestaĵo estis modela aranĝo kiel esperantistoj devus kunlabori kun la lokaj institucioj kiam ili havas iun amasan aranĝon, aparte en iom pli malgrandaj urboj kiuj kutime pretas akcepti tian kunlaboron. La unua publika kantado de Eŭropa himno elvokis fortajn emociojn ĉe la publiko kaj montris ke ĝuste la manko de oficiala teksto por Eŭropa himno estas grava manko, kiun nia esperantista propono povus tre bone solvi.

Samtage la urbestro ankaŭ akceptis la kongresanojn.

PEA havis lasttage ankaŭ regulajn kunsidojn de siaj organoj. Oni elektis novan estraron, kiun prezidados en la sekva mandatperiodo Arkadiusz Zychiewicz.

**Zlatko Tišljar**

## Intervjuo de TV-redaktorino kun la organizantino de la evento - dediĉita al Eŭropa Tago Halina Komar

**Demando:** Ĉu ni estas atestantoj de historia momento - publika prezento de Himno de Eŭropo?

**Respondo:** Jes, mi pri tio revis, sed ne supozis, ke tio estas realigebla. Ni sukcesis, ĉar unue ni trovis en nia urbo favoran Urban Estraron, due - kunlaboreman, bonegan Urban Kulturcentron, kiu donis al ni reĝisoron de la manifestaĵo - sinjoron Stanislaon Szarek, kiu konvinkis la korusojn kaj grandiozan orkestron soldatan por tiucela laboro.



Tial ni sukcesis fari unuan publikan lanĉon en Eŭropo. Tiu ĉi teksto ankoraŭ ne estas oficialigita, ni memoru ke novaj preskriboj de la Lisbona Traktato ebligas civitanajn iniciatojn kaj ekvalidos nur en 2012, sed tio ĉi kio okazis ĉe ni, heroldas la kampanjon: ni, civitanoj montras nian volon havi himnon por kanti ĝin! Ĝis nun la Eŭropa Himno estas la nura en la mondo sen vortoj - neniuj konsentis kanti himnon laŭ la vortoj de Schiller (germane), ankaŭ oni ne interkonsentis pri iuj vortoj anglalingvaj por la himno de ĉiuj eŭropaj nacioj...

Ni proponas tekston de himno en grandioza lingvo - la lingvo neŭtrala, kreita en Pollando kaj de Polo, la lingvo amika, kiu ne malhonorigas iun ajn nacion kaj ŝtaton, ĉiu povas ĝin kanti...

Tial, por ke la evento fariĝu vere historia, ni - eŭropaj esperantistoj, komencos kampanjon oficialigi tiun tekston en 2012, kiam en 7 eŭropaj landoj estos kolektotaj subskriboj de unu miliono da EU-civitanoj, kiel popola iniciato prezentota la proponon al Eŭropa Komisiono laŭ la kondiĉoj de Lisbona Traktato. Kaj ni tion faros certe! Kaj KOMENCO estis ĝuste tie ĉi, en Pollando, Nowy Sacz.

**Demando:** Tiu ĉi manifestacio okazis en kadro de Tutpollanda Kongreso de Esperantistoj en Nowy Sacz?

**Respondo:** Jes, krom la gastoj el tuta Pollando ni havas reprezentantojn el dek eŭropaj landoj kaj tio estas taŭga momento por ilia ĉeesto en la manifestaĵo kaj ebleco transdoni la informon pri la evento al E-organizoj en iliaj landoj.

**Demando:** Kia estas la ideo de via kongreso?

**Respondo:** la titolo de la Kongreso estas: „Civitana Aktiveco de Esperantistoj” - kaj la ateston pri ĝia valoro ni havis ĝuste ĉi tie, ĉar ni tion iniciatis kaj organizis, sukcesis allogi aliajn... Ni estas fieraj kaj tre feliĉaj, vere! Dankon.



Interparolis: Anna Serafin el TV INSAT kun Halina Komar, organizantino de 32a TEK en Nowy Sacz, la 5-an de majo 2011.

*Anna Serafin*

## **La du ĉefaj Esperanto-asocioj en Francio kune lanĉis Interasocian Petskribon por Esperanto en bakalaŭra ekzameno**

La bakalaŭra - aŭ abiturienta - ekzameno, plej fama diplomo en la franca lerneja sistemo estas la tutlanda lice-fina ekzameno en la 12a klaso. Sukcesinte pri ĝi liceanoj rajtas eniri universitaton. Pli ol 50 lingvoj estas trapaseblaj kiel libere elekteblaj fakoj ĉe la bakalaŭra ekzameno.

Post akcepto fare de Komitatoj de la 2 asocioj (ESPERANTO-FRANCE kaj SAT-AMIKARO) kaj plurmonata preparlaboro, la oficiala komenco de la kampanjo okazis en la plej taŭga loko kaj tempo, kadre de la Interasocia Renkontiĝo de Esperanto ĉe Mediteraneo (IREM) en Seto, proksime de Montpeliero, suda Francio, fine de aprilo 2011.

La celoj de la kampanjo estas:

- organizi grandan tutlandan inform-kampanjon por Esperanto, per aktivigo de ĉiuj esperantistoj de la lando laŭ iliaj eblecoj
- kolekti liston de eminentaj subtenantoj kiel "unuaj subskribantoj" (78 francaj eminentuloj subskribis) kaj "duaj subskribantoj".
- laste sed ne balaste, ĉerize surtorte, enkonduki Esperanton kiel libere elektebla fako ĉe la bakalaŭra ekzameno en Francio.

Subskribu la Petskribon precipe francoj. La Petskribo ja koncernas francian ekzamenon trapaseblan nur de francaj lernejoj.

Bonvenas subtenmesaĝoj de nefrancoj. Sciigu la informon al viaj francaj geamikoj kaj gekonatoj! Subtenu la Petskribon. Eventuale, organizu similan iniciaton vialande!

La retadreso de la Petskribo:

<http://esperanto-au-bac.fr>

*Aleks Kadar*

## DISDONADO DE LETERO DE EEU AL ĈIUJ PARLAMENTANOJ DE EU-PARLAMENTO

Ni sukcese disdonis la leteron de EEU al ĉiuj Eŭropaj Parlamentanoj la 5-an de majo 2011 posttagmeze en la Eŭropa Parlamento, en 22 el la 23 oficialaj lingvoj de EU (mankis nur la malta). La leteron subskribis parlamentanino Małgorzata Handzlik kaj mi kiel prezidanto de EEU. Mi ŝatus danki al Maja Tišljar kaj Jozef Reinvar, kiuj distribuis la leteron kun mi tra la poŝtkestoj de la parlamentanoj en la brusela parlamentejo, sed mi aparte dankas al Maja pro la grandega laboro: ŝi mendis, preparis kaj ordigis la tradukojn, aldonis la tekston de la himno ĉiam en Esperanto kaj en gepatra lingvo de la alparolato. Ŝi eĉ faris apartajn leterojn por nederlandanoj, nederlandlingvaj belgoj, franclingvaj belgoj, francoj, luksemburganoj, svedlingvaj finnoj, anglalingvaj irlandanoj kaj irlandlingvaj irlandanoj, ktp. Sufiĉe komplika laboro kiam temas pri 751 eŭrop-parlamentanoj el 27 landoj uzantaj 23 oficialajn EU-lingvojn!



Jen la letero en la angla, sendita al britaj kaj maltaj parlamentanoj:

May 2011



**Eŭropa Esperanto-Unio, Avenue Louise 405, bte 9, BE-1050 Bruselo, Belgio** [www.europo.eu](http://www.europo.eu)

### Civil Society Platform on Multilingualism

On 30 March 2011, the Civil Society Platform on Multilingualism, a forum of 29 pan-EU organisations set up by the European Commission in 2009, reached agreement on its final report (some 200 pages). Among its recommendations are:

“Research the propedeutic qualities of various languages to discover which second language is most likely to encourage subsequent language-learning. An innovative UK programme [1](#) has been testing an alternative propedeutic approach since September 2006 (sections 4.2 and 6.4.1) and this may have implications for the order in which languages are learned.”

The aim is to improve language-learning in general, particularly for weaker students, and thus contribute to the Europe 2020 objective of reducing the number of school dropouts from the present 15% to below 10%. For further details, please contact [sean.oriain@web.de](mailto:sean.oriain@web.de).

The singing of a common anthem has proved a powerful agent in strengthening national identity. The EU lacks this powerful resource to create an emotional link between the citizen and Europe, as there is no common text of the European Anthem that citizens from different countries can sing together. The words of Schiller’s beautiful Ode to Joy are not official [2](#), nor are they Europe-specific. The attached text [3](#) has been enthusiastically acclaimed when sung. EEU is considering seeking the support of 1 million citizens for it under the new Citizens’ Initiative. We would be grateful if you could indicate whether you support the singing of the European Anthem in a common neutral European language, and whether you find the attached text acceptable. Thanking you.

Yours sincerely.

Małgorzata Handzlik, MEP

[mhandzlik@europarl.europa.eu](mailto:mhandzlik@europarl.europa.eu)

Dr Seán Ó Riain, president of EEU

[sean.oriain@web.de](mailto:sean.oriain@web.de)

---

1 [www.springboard2languages.org](http://www.springboard2languages.org)

2 [http://europa.eu/abc/symbols/anthem/index\\_en.htm](http://europa.eu/abc/symbols/anthem/index_en.htm)

3 This version is sung at <http://www.ipernity.com/doc/pajo.zlatko/3362297>.

---

**European Anthem**  
**Music by Ludwig van Beethoven**  
**Text in Esperanto by Umberto Broccatelli**

Kantu kune amikaro, ni la ĝojon festas nur  
 Nek rivero nek montaro plu landlimoj estas nun  
 Ho Eŭropo, hejmo nia, tro daŭradis la divid'  
 Nun brilegu belo via, ĉiu estas via id'!  
 Via flago kunfratigas homojn post milita temp'  
 Via leĝo nun kunigas civitanojn en konsent'.

Let us sing together, friends, let us celebrate our joy,  
 Neither river, nor the mountains, no more borders, ne'er again.  
 Oh, Europa, our own home, you were divided far too long,  
 Let your beauty now shine forth, we are all your children.  
 Your flag now unites as brothers, those whom war did once divide,  
 Your own law now brings together, citizens in full accord.

Chantons ensemble, les amis, fêtons seulement la joie,  
 Il n'y a plus ni rivière, ni montagne, ni frontière.  
 Ho Europe, notre foyer, il y a trop longtemps que règne la division.  
 Que maintenant respandisse ta beauté, chacun de nous est ton enfant.  
 Ton drapeau réunit fraternellement les hommes après le temps des guerres,  
 Ta loi nous rassemble, tous citoyens, tous d'accord.

## LA NAŬA KONGRESO DE KROATAJ ESPERANTISTOJ

La 14-an de majo 2011 okazis la 9-a kongreso de kroataj esperantistoj en urbo Bjelovar. Partoprenis preskaŭ ducent patoprenantoj kaj gastoj el deko da landoj. La karakterizo de la kongreso estis signifa partopreno de esperantistoj el preskaŭ ĉiuj respublikoj de iama Jugoslavio kaj renkontoj post dudeko da jaroj de iamaj konatoj kaj amikoj. Interalie eblis revidi homojn kiuj ne partoprenis en E-aranĝoj de antaŭ 40 aŭ eĉ 50 jaroj. Okazis emociplenaj renkontoj kaj rerenkontoj. Nepe menciindas escepte granda kaj sincera subteno al la kongreso far la urbestro Antun Korušec. Pro tio eblis aferoj kiuj malofte estas je dispono al esperantistoj. La urba muzeo disponigis siajn ejojn por impona ekspozicio pri historio de E-movado en Kroatio (parte Jugoslavio) ĉefe el la kolekto de Josip Pleadin. Je la dispono estis tre bela kulturdomo kaj la kultura programo estis impreso abunda. La kongreso okazis sub la signo de 100-jariĝo de unua tradukita literaturaĵo el la kroata lingvo al Esperanto, la romano de kroata verkisto August Ŝenoa »Trezoro de la orajisto«. La tradukon efektivigis Bjelovarano Fran Kolar kaj fondinto de la Bjelovara E-societo. Tial pluraj eroj de la kultura programo rielatis al literaturo kaj libroj. Grupo de bjelovaraj mezlernejoj prezentis spektakleton el la libro de Ŝenoa, Vida Jerman prezentis recitaĵojn el Poezio de Vesna Parun, Zdravko Seleš prezentis du novajn librojn: esperantigitan porinfanan libron de Anĝelka Martić »Pirgo« (ĉeestis ankaŭ la aŭtorino) kaj la kroatlingvan tradukon pere de Esperanto de la libro de hungara verkisto G. Gardonyi »Sklavoj de Dio« tradukitan de Aleksandar Kocijan. Spomenka Ŝtimec prezentis E-lingvan version de la Vivo de Damoru, verkon tradukitan de Malasre Dashgupta el la bengala lingvo. Saša Pilipović kaj Miĉo Vrhovec ludis parton el la spektaklo »10 tagoj de kapitano Postnikov« baze de la libro de Mikaelo Bronstein. Kantis kelkajn kantojn Neven Mrzlečki, operkantisto kaj originala E-verkisto kaj komponisto.

En la malferma parto interalie parolis la urbestro Antun Korušec, prezidantino de KEL, Judita Rey-Hudeček kaj mi kiel sekretario de EEU pri celoj de EEU en EU.





Aparte interesa estis la fakto ke malgraŭ la glora pasinto de Esperanto en Bjelovar, nuntempe ne ekzistas tie E-societo, tamen ekzistas sufiĉe multaj esperantistoj kiuj konsistigis LKK-on por la kongreso kaj tre sukcese organizis ĉi tiun kunvenon. La kongresan komitaton prezidis Ljerka Stilinović kaj oni sendube devas diri ke la centra motoro de la kongreso kaj ekspozicio estis Josip Pleadin. Ankaŭ la du libroj prezentitaj (Pirgo kaj Božji robovi) venas el la eldonejo Grafokom, kiun li gvidas.

La kongreso estis ankaŭ okazo por diskutoj kun homoj el diversaj landoj.

**Zlatko Tišljarić**

## **Krom la lingvo Angla, ankaŭ Esperanto estas populara en la hungaraj ŝtataj lingvaj ekzamenoj**

Mi kaptis informon de Aleksandro Horváth [horva:t] pri gazet-informo pri nombro de Esperanto-ekzamenoj (de jaro al jaro, tra jaroj) far la Hungara ŝtata Ekzamenkomisiono.

Poste ankaŭ mi iom kontrolis la eĥon de la fenomeno konata por esperantistoj, sed jen konigata ankaŭ al ne-esperantistoj. La lingvo Angla estas nekompareble populara, la nombro de ekzamenoj pri ĝi kreskas po dekmiloj. Ankaŭ la lingvo Germana estas tre populara, tamen ekzamenoj pri ĝi de jaroj nun malplimultiĝadas. Pri la lingvo Franca oni ekzamenas po 2000-4000 personojn jare, pri la lingvo Itala po 1000-2000, stabile, ekde la jaro 2006.

Pri Esperanto oni ekzamenas po (ĉirkaŭe) kvinmil (5000) personojn jare. Oni iom miras, sed oni konstatas la kvantan kreskon ĉe Esperanto kompare al la komenco kaj kompare al aliaj lingvoj, kaj ĉefe, kompare al supozoj.

Hungaraj esperantistoj konscias, ke post kvanta kresko mankas aktiviĝo de novuloj en la Esperanto-movado.

Serio da nombroj ekde 2001:

2001: 2 013  
 2002: 3 785  
 2003: 3 132  
 2004: 2 422  
 2005: 2 985  
 2006: 4 089

2007: 6 163  
 2008: 5 596  
 2009: 5 586  
 2010: 5 422

Sume: 41 193

**Blazio Vaha**

## Mia brila ideo: la angla estas pinta, sed iam ĝi formortos

Kvankam ĝi estas vaste parolata transmonde, la angla lingvo estas kondamnita al morto, diras unu eminenta lingvisto.



- [Robert McCrum](#)
- [The Observer](#), Dimanĉon la 31an de oktobro, 2010




Lingvisto: Nicholas Ostler fotita en sia biblioteko.

Fotis Karen Robinson

En la disputema kaj tro plena mondo de anglalingvaj studoj, Nicholas Ostler elstaras kiel originala analizisto de temo kiu kutime generas pli da varmo ol lumo. La libro *Empires of the Word* [Imperioj de la Mondo] (2005) de Ostler estis kritike aprobata historio de la lingvoj de la mondo bazita sur profunda scio de lingvika teorio kaj familiareco kun ĉirkaŭ 26 lingvoj.

La lasta lingvofranko: la angla ĝis la reveno de Babelo

de Nicholas Ostler



En sia nova libro, *The Last Lingua Franca* (Allen Lane), li alportas vastan lingvan perspektivon sur la rolon de la estonteco de tutmonda angla lingvo. Lia provoka konkludo – ke la angla plej verŝajne sekvos la vojon de la persa, la sanskrita kaj la latina kaj, dum multaj jarcentoj, neeviteble formortos – alportos esperon al la franca, kaj malesperon al multaj usonaj lingvopatriotoj.

Ostler estas prezidanto de [Foundation for Endangered Languages](#) [Fondaĵo por Endanĝerigitaj Lingvoj], senprofitcela organizaĵo kiu ekzistas por subteni, ebligi kaj helpi en la dokumentato, protekto kaj antaŭenigo de endanĝerigitaj lingvoj. Li loĝas en Bath.

### Ĉu vi bonvolus koncize esprimi la centran temon de via libro?

La angla supreniĝas en la momento, en maniero verŝajne senprecedence en la monda historio. Sed la monda historio estas plena de lingvoj kiuj dum iom da tempo dominis, tamen ne estas multe da ili kun ni nun. Do la esenca ideo estas vidi kio okazis al ili, kaj vidi ĉu tio povus iel rilati al la situacio de la angla, kiu estas hodiaŭ la unua monda lingvafrankao.

### Ĉu ne certe la historiaj cirkonstancoj kiuj kondukis al la malkresko de lingvo kia la persa tre malsimilas al la cirkonstancoj en kiuj sin trovas hodiaŭ la angla?

Nu, neeviteble ili malsamas en tio, ke la persa dominis nur en okcidenta Azio, kaj ĝi seniĝis de sia potenco pro la invado de eksteruloj, homoj kiuj venis kvazaŭ de alia planedo: la britoj en Hindio unuflanke, la rusoj en centra Azio aliflanke. En la historio de lingvoj, kutime necesas jarcentoj por ke okazu la neeviteblo. Verŝajne necesis 700 jaroj post kiam la persa ne plu havis evidentan militan aŭ kulturen vivsubtenon, ke ĝi estu senvalorigita. Kaze de lingvo kia la latina, necesis jarmilo. Tiuj aferoj ja bezonas longan tempon, sed estas nenia kialo kredi, ke la angla estos escepto en la speco de trajtoj kiujn oni povas observi.

**Sed tutmonda kapitalismo, tutmondaj amaskomunikiloj, tutmonda politiko - ĉu ne la tuto de tio malebligas, ke la angla finfine malaperos?**

Jes, sed tiaspeca afero okazis jam pasintece. Mi volas diri, ĉu vi havas klarigon, kial la latina ne ricevis grandan antaŭenpelon pro la invento de la presilo? Ĝi ja ricevis tujan ŝvelon, ĉar komence la alfabetuloj ĝenerale scipovis legi la latinan. Sed la tendenco la alfabeteco en la loka lingvo emis superŝuti la latinan. En la nuna momento, anglaparolantaj grupoj tucerte kreskas, sed estas nur unu direkto por iri de la supro.

**Kiel novaj teknologioj - tiaspecaj aferoj kiuj permesos tujan tradukon inter lingvoj - formas la estontecon?**

Estis la heredita sagaco en lingvoteknologio, ke maŝintradukado ne sufiĉe bonas. Sed ĉio kio malebligas al ĝi esti sufiĉe bona estas nur la problemo de skalo. La maniero en kiu oni nun antaŭeniga maŝintradukadon signifas tutsimple esti kapabla procedi pli kaj pli da datumoj por trovi la signifajn modelojn. La potenco kaj malmultekosteco de komputiloj pliiĝas la tutan tempon. Neniel la problemeto de nekongrueco inter lingvoj staros en ĝia vojo dum longa tempo.

Kaj ĉar oni faras per datumbazoj, la tekniko kiu solvos la problemon solvos ĝin por ĉiuj lingvoj, ne nur la gravaj. Do eĉ foraj aborigenaj grupoj profitos - eble generacion pli poste, eble pli frue. Kaj kiam tio okazos, homoj povos atingi plenumon en siaj propraj lingvoj, kio estas tio kion ili ĉiukaze ĉiam deziris fari.

**Laŭ iama konvencia sagaco novaj formoj de la angla - jamajka dialekto aŭ Singlish [angle bazita kreolo parolata kaj skribata neformale en Singapuro] - fariĝos reciproke nekompreneblaj. Tamen tio ankoraŭ ne okazis.**

Nu, okazas iom post iom. Sed mi volas distingi inter lingvo kiu vastiĝas nature, kiel gepatra lingvo, kaj lingvo kiun oni vastigas per varbado, kiu estas lingvafrankao. Lingvafrankao estas lingvo kiun oni konscie lernas pro neceso aŭ deziro. Gepatra lingvo estas lingvo kiun oni lernas ĉar oni ne povas ne fari. La kialo, ke la angla vastiĝas tra la mondo en la nuna momento estas pro ĝia utilo kiel lingvafrankao. Globish - simpligita versio de la angla uzata ĉirkaŭ la mondo - estos tie dum ĝi estos bezonata, sed ĉar oni ne akiras ĝin kiel gepatran lingvon ĝi ne estas tipe parolata de homoj al siaj infanoj. Ĝi ne efektive atingas la unuan stadion, la kernan unuan stadion por longdaŭra pluvivado de lingvo.

**Vi funkciigas la Fondaĵon pr Endanĝerigitaj Lingvoj. Kion tiu faras?**

Duono de la lingvoj de la mondo havas malpli ol 10 000 parolantojn, kaj tiuj ŝajnas perdati la parolantojn kiujn ili havas. La celo de la fondaĵo estas atentigi pri tio kiel aferon de zorgo, por kunigi homojn kiuj havas zorgojn pri tiujn lingvoj, tiel ke ili povu lerni unu de alia.

## **Eŭropa Bulteno. 2011. № 5 (105) Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.**

**Finredaktita:** 2011-05-25

**Redaktoro:** Zlatko Tišljarić

**Kunlaborantoj:** Brian Barker, Anna Serafin, Aleks Kadar, Blazio Vaha

**Teknika redaktoro:** Raymond Gerard

**Leterojn kaj komentojn sendu al EEU:**

**Rete:** [ztisljar@gmail.com](mailto:ztisljar@gmail.com)

<http://www.gazetejo.org>



**Enhavo:**

- [BRITA ESPERANTO-MOVADO](#)
- [POLA ESPERANTO-KONGRESO KAJ EŬROPA HIMNO](#)
- [Intervjuo de TV-redaktorino kun la organizantino de la evento - &nbsp;dediĉita al Eŭropa Tago](#)
- [La du ĉefaj Esperanto-asocioj en Francio kune lanĉis - Interasocian Petskribon por Esperanto en bakalaŭra ekzameno](#)
- [DISDONADO DE LETERO DE EEU AL ĈIUJ PARLAMENTANOJ DE EU-PARLAMENTO](#)
- [LA NAŬA KONGRESO DE KROATAJ ESPERANTISTOJ](#)
- [Krom la lingvo Angla, ankaŭ Esperanto estas populara en la hungaraj ŝtataj lingvaj ekzamenoj](#)
- [Mia brila ideo: la angla estas pinta, sed iam ĝi formortos](#)

**Ligiloj:**

- <http://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Barlastono&action=edit&redlink=1> Redaktado de Barlastono - Vikipedio
- [http://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Wedgwood\\_Memorial\\_College&action=edit&redlink=1](http://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Wedgwood_Memorial_College&action=edit&redlink=1) Redaktado de Wedgwood Memorial College - Vikipedio
- <http://eo.wikipedia.org/wiki/1976> 1976 - Vikipedio
- [http://eo.wikipedia.org/wiki/Brita\\_Esperanto-Asocio](http://eo.wikipedia.org/wiki/Brita_Esperanto-Asocio) Brita Esperanto-Asocio - Vikipedio
- <http://eo.wikipedia.org/wiki/Esperanto-asocio> Esperanto-asocio - Vikipedio
- [http://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia\\_Tago\\_de\\_la\\_denaska\\_lingvo](http://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Tago_de_la_denaska_lingvo) Internacia Tago de la denaska lingvo - Vikipedio
- [http://eo.wikipedia.org/wiki/La\\_Brita\\_Esperantisto](http://eo.wikipedia.org/wiki/La_Brita_Esperantisto) La Brita Esperantisto - Vikipedio
- <http://eo.wikipedia.org/wiki/Stoke-on-Trent> Stoke-on-Trent - Vikipedio
- [http://eo.wikipedia.org/wiki/West\\_Midlands](http://eo.wikipedia.org/wiki/West_Midlands) West Midlands - Vikipedio
- <http://esperanto-au-bac.fr/> Campagne pour l'espéranto au bac
- <http://esperantolobby.wordpress.com/> Esperanto Lobby
- [http://europa.eu/abc/symbols/anther/index\\_en.htm](http://europa.eu/abc/symbols/anther/index_en.htm) EUROPA - The European anthem
- [http://ikso.net/broshuro/pdf/malkovru\\_esperanton\\_en.pdf](http://ikso.net/broshuro/pdf/malkovru_esperanton_en.pdf) Discover Esperanto
- <http://observer.guardian.co.uk/> Observer | From the Observer | guardian.co.uk
- <http://www.esperantolobby.net/> Esperanto Lobby
- <http://www.guardian.co.uk/profile/robertmccrum> Robert McCrum | guardian.co.uk
- <http://www.guardianbookshop.co.uk/BerteShopWeb/viewProduct.do?ISBN=9781846142154> Last Lingua Franca - Nicholas Ostler | Guardian bookshop
- <http://www.ipernity.com/doc/pajo.zlatko/3362297> ipernity: Eŭropa himno en Esperanto - by Zlatko Tišljarić - Pajo
- <http://www.jusnews.co.uk/2011/03/festival-of-languages-draws-a-huge-learning-curve/> Hundreds flock to Languages Festival | JUS News
- <http://www.ogmios.org/> Foundation For Endangered Languages - Home
- <http://www.springboard2languages.org/> Springboard... to Languages
- <http://www.w3.org/1999/xhtml> YouTube - The One Show does Esperanto
- <http://www.youtube.com/watch?v=INC1bV8kGk> YouTube - The One Show does Esperanto
- [http://www.youtube.com/watch?v=Q-XozG0RSCo&feature=player\\_embedded#at=163](http://www.youtube.com/watch?v=Q-XozG0RSCo&feature=player_embedded#at=163) YouTube - Languages Matter!